# SENNACIULA LIBERPENSULA PAĜO

N-o 20. – REDAKTAS LIBERPENSULA SEKCIO DE SAT. – Manuskriptojn sendu al: KURT HUBRICHT, Leipzig O 30, Mariannenstr. 22
Sekretario de la Sekcio: KURT KLAPS, Danzig, Karpfenseigen 12

## El "Misteroj de l' kristana antikveco" de G. Fr. Daumer

### Fondiĝ- k inaŭgur-oferoj

Unu el la plej strangaj tradicioj, en sfero de l' germana fabelaro, estas jena: Al la kavaliro de Uĥtenhagen, kies kastelo estis lokita sur kastelmonto apud Frajenvalde, promesis la al li dankŝulda princo-elektisto tiom da tero, kiom la kavaliro povus ĉirkaŭrajdi de sunleviĝo ĝis sunsubiro. La kavaliro ekrajdis, renkontis en Nojenhagen paŝtiston, senkapigis lin k starigis foston apud la kadavro; la foston oni ankoraŭ konservas en la komunumoficejo de Nojenhagen. Tiel oni limigis per fostoj, ekfondis bienojn; oni senkapigis iun simplan viron, kiun oni hazarde renkontis k tiel oferis por dio. — Kiam oni konstruis digojn, kastelojn, pontojn, urbojn ktp., — laŭ antikva molohisma superstiĉo, la konstruo ne estis fortika, eĉ ne povis esti finita, sen enfoso aŭ enmasono de homoj, nome infanoj k virinoj; se oni ne jam de komenco faris tiajn kruelaĵojn k montriĝis malfaciloj por la konstrulaboro, tiam ankaŭ poste, oni donis fondiĝ-oferojn al dio.

Laŭ dana fabelo oni volis konstrui digon en Kopenhago; kiomfoje oni ekkonstruis, tiomfoje ĝi disfalis. Nun oni prenis senkulpan knabineton, sur la diga fundamento sidigis ŝin ĉe tablo, donis al ŝi manĝojn k ludilojn. Dum la knabineto manĝis k ludis, 12 majstroj konstruis volbon super ŝi k nun surkonstruis — dum muzikado, digegon, kiu ĝis nun fortikege staras.

En Aria 1000 viroj ekmasonis ponton; kion ili dumtage ekkonstruis, tio dumnokte disfalis. Nun eksonis el la ĉielo anĝela voĉo, ordonanta, ke oni enfosu homon, nome la edzinon de l' konstruestro. Kiam nun la edzino venis al la konstruestro, ĉi tiu pretekstis, ke lia ringo falis en dig-fundon; la edzino sin proponis alporti ĝin. Dum ŝi plenumis tion, oni rapide enmasonis ŝin.

En la antikva kastelo Heneberg oni vidas en muro niĉon; pri tiu rakontas maljunuloj jenon: Ĉe la ekkonstruo de tiu kastelo iu masonisto vendis sian fileton por vive enmasoni lin en tiu ĉi niĉo, por ke la kastelo estu nevenkebla. La infano estis de la kruela patro mem enmasonata; ĝi manĝis bulkon k plore ekkriis dum la masonado de la lasta ŝtono: "Ho, patro, patro, kiel mallumiĝas!" Ĉi tio kortuŝegis la viron, li falis de ŝtupetaro k rompis sian kolon.

Ke la patro mem enmasonis sian infanon, tio ne estas individua kruelo, ĉar li mem pro ĉagrenego pereis. Ĝi okazis ja pro postulo, pro kondiĉo, por ke la efiko estu tiom pli forta; la pleja kruelaĵo estas laŭ molohismaj principoj la pleja piaĵo, pleja sanktaĵo k plej dia volo.

En la antikva kastelo Libenŝtajn, estas enmasonita infano, vendita de sia patrino. La popolo ankoraŭ rakontas, kiel la infano ploregis, baraktegis, sed neniom helpis. La popolo ankoraŭ kredas aŭdi dumnokte la ploradon de l' infano k asertas, ke la masonistoj, kiuj enmasonis ĝin, fariĝis strigoj, ĉirkaŭflugantaj ankoraŭ nun la kastelruinon.

Se tiuj kredoj k moroj vere estis tiel ĝeneralaj, tiam en mezepoko, ĉe la grandnombro da kasteloj k ties malkonstruado k rekonstruado oni bezonis multegon da homoferoj, kies enmasonon oni konsideris utila k necesa.

Ankoraŭ fabelo tia, kiu cetere jam montras ioman mildon k eblon de forlaso de tiu kruelo — okazinta en Magdeburg. Tie estas malnova muro apud la Kreten-pordego, kie oni enmasonis infanon dum la ekkonstruado de l' urbo. En la muro oni konstruis niĉon, en ĝin starigis tableton kun oro k pano; la civitanoj devis loti. Kiun trafis la loto, tiu devis doni sian infanon. Oni sidigis ĝin ĉe la tablo. Nun dependis de tio, kion ĝi prenis de la tablo: se ĝi prenis la oron, tiam ĝi estis perdita, ĉar la oro signifis morton. Ĝi prenis la oron, k dum ĝi ludadis, oni senkompate enmasonis ĝin.

La fabeloj sufiĉe gravas por ne lasi dubon pri la iama kutimo de l' kristana kruelo; oni nur pensu pri la, de ĉielo postulema anĝelvoĉo. Cetere ĉi tiuj estas konfirmitaj per konformaj trovaĵoj.

Ekz. en la kastelo Plese ĉe Getingen, en ties pordega muro oni trovis infanĉerketon enhavanta neputrintajn ostojn (Gotŝalk). Same en murego de iama kastelo Krajnberg, proksime de l' urboj Baĥ k Salcungen, oni trovis infanskeleton (Gotŝalk III). Je tio Gotŝalk notas: "Ĉi tio treege memorigas al la kruela kredo, ke ĉe ekkonstruo de kasteloj, por gardi ilin kontraŭ akcidentoj, oni rabis aŭ aĉetis infanojn de malriĉaj gepatroj por vive enmasoni ilin. Ŝajnas, ke ĉi tiu kutimo regadis, ĉar la mortintoj el la kastelposedanta familio ĉiam estis entombigataj en kastelpreĝejo, kasteltombejo aŭ en proksima vilaĝtombejo, sed ne estas konata, ke tia kadavro estas enmasonita en kastelmuroj."

La afero estas tiom pli certa, ĉar tiu kredo ankoraŭ dum la pasinta jarcento vivis inter la popolo. Verema k fidinda inspektoro de porakvo-konstruado rakontas jenon.

Dum la jaro *1813* sur la rivero Elbe rompiĝis digo, kies rekonstruo kaŭzis malfacilan laboron. Venis maljunulo k diris al li: "Vi ne povos rekonstruigi tiun ĉi digon, se vi ne enfosos senkulpan infanon." Pli novan ekzemplon notas J. Grim, laŭ kiu dum 1843 ĉe pontkonstruado en Hale la popolo opiniis, ke oni devus enmasoni infanon en fundo (Grim, Mitoj).

Ĝis nun nur estis menciite pri la neekleziaj fondiĝoj k konstruoj, sed simile ankaŭ estas ĉe la ekleziaj konstruoj ktp. Ĉe la fondiĝo de katedralo en Strasburgo estis laŭ plej signifa tradicio, enfosataj du fratoj, ĉar aliel la konstruo ne fortike starus (Aĥim de Arnim, Berlin 1840). Plue ni aŭdas, ke iam sub la altaro oni enfosis ŝafidon por certigi la ekziston k prosperon de l' preĝejo. La enfosita ŝafido estas konsiderita kiel fantomo k tio antaŭsignifas la rilaton al infankadavro. Se dum la tempo, en kiu ne estas diservo, oni iras en la preĝejon, tiam oni vidas ŝafidon kuranta k malaperanta. Ĝi estas la ŝafido preĝeja. Se la lasta montriĝas sur la tombejo al la tombisto, tiam ĝi avizas la morton de infaneto, kiu baldaŭ estos entombigita (Afcelius III). Tiu ĉi ŝafido signifas la morton de infano: "Kia frapanta, perfida interrilato!" Certe iam oni enfosis aŭ enmasonis infanojn k nur pli poste ŝafidojn, kiam ĉesis la homoferado. Pliaj tradicioj estas; oni enfosas porkojn k kokojn sub domoj, same vivan, blindan hundon ktp. sub stalpordo aŭ staltrogo. En Grekio estas la opinio, ke la unua preterpasanto je fundamenta ŝtono ĉe novkonstruota domo, mortos dum la sama jaro; por malebligi ĉi tiun malfeliĉon, la masonistoj mortigas kokon sur la ŝtono, aŭ ŝafidon. Laŭ fabeloj oni pelis kokon trans novkonstruitan ponton en Frankfurt. Laŭdire la unua viva estaĵo, kiu transiris ponton novan, apartenas laŭ kontrakto al la diablo (Grim, Fabeloj I). La tombejon oni inaŭguris per ofero de vive enfosita ĉevalo, antaŭ ol oni entombigis homkadavron. Ankaŭ la ĉevalon oni konsideris kiel fantomon, kiu avizas feliĉajn k malfeliĉajn okazaĵojn. En Ŝonen sur iu tombejo, kiu eĉ nomiĝas laŭ tio, montris sin blanka ĉevalo (Grim k Afcelius). Ankaŭ, anstataŭ la lastnomita besto, iam estis oferata viva homo.

*Elgermanigis 1180.*